Ricarda Huch,

Amo

tradukita de Manfred Retzlaff

La nokto venas kun pratempa sci',
Solviĝas la kirasoj kaj ligaĵoj,
Ŝanĝiĝas ĉiuj formoj kaj vestaĵoj,
Egale kovras la kverelon ĝi.

Moviĝas tiu ŝtonmontaro ĉi,
Inundas ĉion kiel marŝvelaĵoj,
Alrampas apetence la krutaĵoj
Kaj trinkas pompon de la galakci'.

Mi tenas vin de vi ĉirkaŭigite,
Migrantoj lacaj post la hejmenir',
Mi sentas vin ensange, karnigite.

De via korp' vestita estas mia.
Ripozas la animo post sopir',
Ne diferencas mia viv' kaj via.[2]

Traduko de la Germana poemo "Liebe" de Ricarda Huch *(∗1864-07.18 – †1947-11-17) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1997-03-22.*

MR-303-3 / Arg-784-1570 (2013-01-20 19:03:34)

Pri la poetino vidu la vikipediejon `http://de.wikipedia.org/wiki/Ricarda_Huch`. *Vidu ankaŭ:* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Ricarda_Huch`.

[2] aŭ:
Ne diferencss mia viv' de via.